

AVANCO 2/95

oficiala organo de kuba esperanto-asocio

ENHAVO

Antaŭen

Du KEA-anoj en Finnlando
Julián Hernández Angulo

3

Kriterioj

Cu instruisto aŭ edukisto?
Manuel O. Rodríguez Rabago

5

Havano vokas

Instigo al leterumado
Maritza Gutiérrez González

6

Noticoj

Steluloj nepre brilas
Kvakerino ce ni
Por ke esperanto restu viva

7

Alexis Otero Castellón

Senhalte

Por plia profesiaĉo
Datreveno tra la kajmano

8

9

Alexis Otero Castellón

Jen nia historio

Rigardo tra kvar jardekoj
Juan Ramón Rodríguez Gómez

10

En la II-an Kongreson


Preparkomitato sin prezentas
Maritza Gutiérrez González

16

Estimataj

Denove, via tribuno frapas la pordon por informado. Kiel konstateblas, anonciĝas junio/decembro, tial ke ni planis aperigi specialan numeron okaze de la Kongreso kaj far ni decidis venigi la aŭgustan numeron decembren. Pro teknikaj kialoj, plej eble ĉi numero mem lanĉotas dum la kongresaj tagoj. Detaloj pri la XVI-a datreveno, kongrespreparoj, kaj aliaj sciindaĵoj, formas la revuon ĉi-foje... Bonan farton, kaj ĝuoplenan legadon, deziras via redaktoro.

Alexis



Kuba
Esperanto-
Asocio

Nacia Estraro

- *Julían Hernández Angulo
Prezidanto. Atentas pri plenumo de la ĉefaj taskoj asociaj kaj tiuj de la opaj fakoj.
 - *Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala sekretario. Kontrolas la internan agadon de la tuta estraro.
 - *Alberto Gabriel Rodríguez Pineda
Finadoj. Flegas administradon en la Nacia Sidejo.
 - *Héctor Jiménez Batista
Instruado. Atentas ILEI-sekcion.
 - *Alexis Otero Castellón
Informado. Ĉefredaktoras en Avanco kaj Noktuo.
 - *Juan Ramón Rodríguez Gómez
Internaciaj k. Publikaj Rilatoj. Okupiĝas pri historio kaj libro-servo.
 - *Martín Castro López
Kulturo. Prizorgas klerigajn aranĝojn.
- Komisiitoj**
- *Pedro Fernández Rodríguez
Korespondanta Kurso.
 - *Roberto Torres Álvarez
Membrokontrolo. Zorgas pri scienco kaj tekniko.

Havano, VII-a jaro, n-ro. 2, junio-decemb. 1995/Aperas tri foje jare/Eldonas Kuba Esperanto-Asocio/pf.: 5120; 10500 Havano, Kubo/Telefonnumeroj: 40-1364 k. 40-4484. Faksno: 53 (7) 338729/Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón/Grafika aranĝo kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez/Kunlaboris: Maritza Gutiérrez, Julián Hernández, Roberto Molina, Alberto Rodríguez, Manuel Rodríguez/Prezo po ekzemp.: 1.00 cup (enl.), 2.00 nlg aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaĵ al KEA-konto ĉe UEA: keaux-u/Subskribitaj artikoloj esprimas la opinion de ties aŭtoroj/Ciuj rajtoj rezervitaj/Reproduktado permesata (bv. indiki la fonton kaj sendu du ekzemplerojn al la redakcio).

Du KEA-anoj en Finnlando

Ci jare, Tampere (Finnlando) estis la ĉerfurbo de la internacia E-komunumo. Tie okazis la 80-a UK, kies ĉefa temo estis "Ni, la popoloj -unu mondo aŭ disaj eroj?" Pli ol 2 300 esperantistoj, el ĉirkaŭ 60 landoj, partoprenis la ĉijaran pintan aranĝon de la rondo familia, inter ili du KEA-representantoj: Maritza Gutiérrez (ĝenerala sekretariino), kaj la aŭtoro de tiu ĉi raporto.

Kunsidoj, renkontiĝoj, aranĝoj, kulturaj vesperoj, kursoj, distraĵoj, ekskursoj, konversaciaj rondoj, konferencoj, ekzamenoj, manĝoj, ktp., taŭgis frame por ke la reprezentantoj de la monda esperantistaro esprimu siajn opiniojn kaj ideojn, interŝanĝu spertojn pri diversaj agadkampoj de la movado, konatiĝu kaj gvu la finnan pejzaĝon, naturon kaj kulturon kaj plifortigu siajn amikajn rilatojn.

En kaj ekster, la Tamperea Talo -bela, taŭga kaj komforta kongresejo- regis bona E-etoso. La atingoj, sukcesoj, sopiroj, bezonoj, aspiroj, kaj esperoj de la zamenhofa familio aŭdigis tra la salonaro.

Certe, la plejmulto el la partoprenintoj revenis hejmen kun pli da forto, energio k. entuziasmo por dadrigi la batalon diverssfere; tamen bezonatas ke ni ĉiuj partoprenu pli aktive la vivon de la socio kiu ĉirkaŭas nin, ke ni estu pli komunikemaj kaj diskonigu la belan kaj noblan trezoron kiun ni havas en niaj manoj, ke ni pli kaj pli trapenetru la scienteknikan kampon kaj ke kelkaj el ni ne perdiĝu en negravaj detaloj kaj banalaĵoj, kio nur haltigas niajn paŝojn.

La Komitato de Universala Esperanto Asocio (UEA), kaj ties laborgrupoj kunsidis pli ol dudek horojn analizante gravajn aspektojn de la movado. Kiel rezulto de tiu laboro elektigis nova estraro:

Prezidanto: Prof. D-ro Lee Chong Yeong

Vicprezidanto: Renee Triolle

Ĝenerala sekretario: Mark Fettes

Ceteraj membroj: Michela Lipari, Amri Wandel, Paul K. Jegorovas kaj De Heros.

Ankaŭ elektigis novaj komitatanoj C, kaj oni akceptis la aliĝon de du landaj asocioj: Rumanio kaj Togolando. Estis analizita la Estrara Raporto, kio stimulis plurnajn intervenojn de komitatanoj, ĉefe en rilato kun financoj. Oni ankaŭ fiksas laborliniojn por la agado en la nova periodo.

La pli bona financa stato de UEA eble estos avantaĝo por realigi diversajn projektojn estontece.

Ni laŭdu la bonan laboron de la eksa estraro kaj ties kompetenta prezidanto Prof. D-ro John Wells, kiu gvidis la Asocion dum du sinsekvaj periodoj. Samtempe, ni bonvenigu la novan estraron kaj ties spertan korean prezidanton, kiuj de nun devas alfronti novajn defiojn por ke la Asocio pliboniĝu kaj antaŭeniru.

Nepras esprimi niajn sincerajn dankojn al la anaro de la loka kongresa komitato, kiu preskaŭ perfekte organizis ĉion. Ili laboris afable, zorgeme kaj profesinivela por sukcesi la kongreson, kaj fakte ili trafis la celon.

Familie kaj intime ĉe ILEI

La 29a ILEI-Konferenco, arigis proksimume kvindek da esperantistoj, kiuj en diversaj sesioj raportis pri la instrua agado diverslande, kaj analizis kiel plej bone enkonduki Esperanton en oficialaj lernejoj, subteni instruprojektojn kaj disvastigi la IL-on.

La konferencanoj profitis la okazon por esprimi vidpunktojn pri la laboro de ILEI kaj ties perspektivoj k. precizigi estontan laborstrategion sub la gvido de Marija Beloséviĉ kaj aliaj ILEI estraranoj. Kvankam oni ne amplekse preparolis la propedeŭtikan valoron de la lingvo, tefaĵo de la konferenco, dum la prelegoj kaj diskutoj fontis konsideroj kaj rimarkoj pri ĝi.

La kvietaj kaj ĝinda naturo ĉirkaŭ la kursejo Duik, proksime de la suda fina urbeto Poorvo aŭskultis la kantaĵojn, serĉojn, rakontojn, kaj poemojn de la konferencanoj dum la vesperoj. Certe, ni tiuj, multe pli familie kaj intime travivis neforgeseblan semajnon.

Ci jare denove kelkaj gimnazianoj ricevis lecionojn de spertaj instruistoj pri diversaj instrufakoj sub la gvido de s-ino Zsuzsa Barcsay. Ili igis la konferencon tre bunta per siaj junaĝoj kaj inteligenteco. Dum la publikaj lecionoj, kaj speciale dum la lasta vespera kulturprogramo, ili brilis.

Dank' al la Internacia Esperanto Instituto, la partoprenintoj vidis ĉiujn lecionojn de Mazi en Gongolando, bonkvalita video kurso por la lernado de la lingvo.

Ni daŭre deziras bonfarton al ILEI kaj fidas je ties evoluo. Ni dankas al tiuj kiuj iel aliel montris sian solidarecon kaj helpon kun Kubo kaj ties E-movado.

Fakte, la 80a UK kaj la 29a ILEI Konferenco lasis espurojn en niaj respektivaj esperantistaj vivoj.

Julian Hernández Angulo

Ĉu instruisto au edukisto?

Manuel O. Rodriguez Rábago

Oni ofte aŭskultas la vorton instruisto en esperantujo, sed neniam mi aŭskultis la vorton edukisto por laboro kiun faras homoj instruantaj Esperanton. Tamen, ĉi tiu parolo speras en niaj vortaroj kaj havas grandan signifon kiun ni, mia opinio, devas koni.

Laŭ mia scio, instruisto estas persono kiu profesie instruas, sed edukisto, estas tiu kiu profesie edukas kaj ne signifas la saman, ĉar instruo nur konsistas en transdono de konoj pri ajna fakto, sed edukado estas instruo plus transdono de kutimoj, kulturo, ktp., al la edukato.

Tio diras al ni ke la signifo de la vorto eduki estas pli ampleksa ol tiu de la vorto instrui. Analizante la signifon de ambaŭ paroloj, mi demandas: Kion vere necesas nia movado... ĉu instruistoj...?

Kelkaj esperantistoj ofte opinias ke oni jam devas komenci plialtigi la lingvo-nivelon de niaj kursfinintoj sed fine la plimulto el ili ne plu deziras esti esperantistoj. Kion, do, solvos nia movado per grupo de lingvaj altniveluloj ekstere de la Asocio? Ĉu vere nia membraro kreskos...? Laŭ mia opinio, tute ne; se oni konsideras ke baza kurso rilatas nur al elementa nivelo, evidentiĝas ke homoj kun eble malpli alta lingvoscio, sed kun pli solidaj konoj pri tio cetera (kio kutas sur la vorto Esperanto), kapablus per si mem trovi vojon ireblan por plialtigo de sia lingvo-kono, eĉ parola. Se male, la lingva nivelo sufiĉe altas k. la primovadaj konoj, antaŭe menciitaj, lamas, eble la homoj iras eksteren, pro manko de la ligo rilatanta ilin, ĉar lingvo sen kulturo estas nenio.

Bedaŭrinde, la teruraĵo okazas kiam tiuj personoj, finiĝintoj de kursoj ne edukigaj, devas defendi la ideojn de Esperanto, sciante nenion aŭ havante nesufiĉan informitecon pri la lingvo, ties kultura fono aŭ interna ideo.

Zamenhof mem diris ke E-o estas ĉefe ideoj. Tial, ni devas eduki la homojn en ĉi gravajn ideojn, por tiel garanti la plifortigon kaj pluekziston de nia movado kun vera forto.

Generale, por arigi homojn ĉirkaŭ ajna grupo aŭ organizo, nepre oni devas eduki ilin, ĉar pere de tia edukado la personoj akceptas la regulojn kaj kutimojn de tiu grupo.

Fine, unu plian fojon mi ripetas, ke tio estas nur mia opinio; la invito intersangi aliesajn ideojn pri la tiom grava temo jam proponatas, jen en aŭ eksterlande.

Ja pravas Manuel O. Rodriguez Rábago forlasas la movadon kaj transdonante edukon pri la interlingva ideo, eble haltigos tiu tendenco. Tamen, nepre klarigendas en Kubo, la E-profesoroj neniel perlaboras la jaron; se temas pri eduki aŭ instrui, ni ja, antas, ne lasas. (N. R.)

Instigo al leterumado

La mikrofonoj de Radio Havano guis la fakton travivi la 80an Universalan Kongreson de Esperanto en Tampere, Finnlando. Dank'al tiu fakto, mi provis sone kapti plurajn eventojn de la internacia renkontigo kaj poste ankaŭ de ILEI-konferenco sesiinta en Ovik, sude de Helsinko.

Unu el la plej gravaj arangoj kongresaj por radioamantoj estis la kunsido de radioaŭskultantoj, kie aŭdis la voĉoj de la redaktoroj de Esperanto de Radio Pekino, Pola Radio, Radio Melbourne, Radio Tallin k. kompreneble, de Radio Havano.

Nova organizaĵo en la radio-rondo estas Amikaro de Esperanto en Radio, nome AERA, kiun entuziasme iniciatis la franco Bruno Masala kaj kies estonteco multe dependas de la kontribuo, kiun radio-amikoj tra la mondo certe faros por pluvivigi Esperanto-elsendon kaj krei novajn programojn en Esperanto.

Krom tio, kadre de la Kongreso, bunta ekspoziciejo montris al kongresanoj grandan radio-ekspozicion kun fotoj, afiŝoj kaj diversaj radio-pecoj el pluraj radiostacioj naciaj kaj internaciaj nuntempe elsendantaj en Esperanto.

La Kongreso ebligis al mi aŭflanke konstati tion, kion reprezentas la kuba agado surtiukampe, nome la havana redakcio; mi konfesas ke vere ĝojigis min konstati ke pluraj korespondantoj kaj aŭskultantoj partoprenis la Kongreson k. propravote dankis al ni pro la elsendoj kaj instigis nin plulabori. Do, ti-foje, mi profitos la paĝojn de Avanco por daŭre instigi la legantojn serĉinian signalon transetere kaj skribi al nia redakcio.

FREKVENCTABELO

HORO UTC	M	KHZ	REGIONO
7.00	49	6195	Okcidenta, Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
15.00	31	9550	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30	25	11720	Eŭropo kaj Mediteraneo
22.00	25	11720	Eŭropo kaj Mediteraneo
23.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
	31	9550	
	49	6195	

Maritza Gutiérrez
RHK-redaktorino

Belartaj Konkursoj

STELULOJ NEPRE BRILAS

Lastminute, ni ricevis tre kontentigan novaĵon. Nia samideano ALBERTO GARCIA FUMERO gajnis la duan lokon de la *Belartaj Konkursoj de UEA*, en la branĉo *Eseo*. Lia konkursaĵo temis pri tradukado, en Esperanton, de verkoj arkaike skribitaj. Elkoran gratulon, nome de la landa asocio kaj la redakto-stabo de *Avanco*, al vera amanto de nia ideo kaj kompetentulo pri lingvaj demandoj. Multajn feliĉojn, estiminda Alberto!

KVAKERINO ĈE NI

"Mi sentis grandan gojon renkonti la kubajn esperantistojn!", esprimis sino Muriel Holmes, brita esperantistino, kiu lastan julion alvenis al Kubo. Malgraŭ tio ke la ĉefa celo de ŝia vojaĝo estis partopreno en la *Kampadejo de kvakeraj familioj* en Gibara, Holguin, ŝi oferis kelkajn horojn por kontakti kubajn samideanojn. En tiu provinco ŝi trovis kvakerajn esperantistojn kaj sin tre impresis la organizitemo de niaj movadanoj. Kvakeroj estas kristanaj religiuloj, kies ĉefa okupiĝo temas pri flegado de moralaj valoroj k. prizorgo de pacemaj sintenoj.

POR KE ESPERANTO RESTU VIVA

Eventoj Cu la lingvo Esperanto kaj la E-movado ankoraŭ ekzistas? Kaj se jes, kiom longe? Eldonantoj de libroj, kasedoj, k.t.p., ĉiutage frontas la problemon pri la magra kvanto da aĉetantoj; organizantoj de aranĝoj nur revas pri ama partopreno; kaj esperantistoj praktikantoj amare renkontas la kreskantajn problemojn kaj prezojn. Sub ĉi titolo k. enkondukaj paroloj, sintezaj niaflanke, la gazeto *Eventoj*, en la numero 0079, furaŭ analizas unu el lastatempaj ĉarmoj de la movado je intermedia nivelo, t.e., ĉu ni kiel esperantistoj pretas garanti la pluekziston de la movado. La artikolo, subskribita de László Szilvási, redaktoro, prezentas, kiel fontoj, tabelojn de UEA mem. Ĉi lastaj montras la bedaŭre konstanteblan malpliigon okazantan. Oni ja sugestas ke, por turni la nunajn tendencojn, zorgendas la jamaj membroj nepras energie trakti demandojn pri instruado kaj influo. Kolofone, la homoj instigatas per trafe titolita frazo: "Ne ploru!, Agu! (La tutan artikolon publikigis *ktuo*, dumonata noticaro de KEA, en ties julia eldono.

POR PLIA PROFESIECO

Dum tri tagoj (21-22-23a de junio), ni okazigis la Nacian Seminarion por instruistoj: La klasoĉambro de la KEA-sidejo plenigis 23 personoj el 8 provincoj (Santiago de Cuba, Guantánamo, Las Tunas, Camagüey, Sancti Spiritus, Matanzas, La Habana kaj Ciudad de La Habana).

La aranĝoj estis precipe gviditaj de la stabanoj de la Nacia Estraro, kvankam kelkajn specifajn erojn reĝisoris reprezentantoj de la diversaj filioj pro ties sperto en tiaj fakoj.

Oni laboris koncerne kun la planita programo, kiu inkluzivis 7 diskuttemojn kaj 7 flankajn aranĝojn, dum matenaj, postagmezaj k. vesperaj sesioj. El la temaro, diversaj prelegoj, kalkulis je du 45 minutaj sesioj, pro la graveco de la pritraktata demando.

La temon Kiel instrui laŭ komunika metodo gvidis Julián Hernández, kiu ankaŭ podiumis en Ĝenerala rigardo al Hindu-Eŭropaj lingvoj kaj ties rilatoj kun Esperanto k. Kiel pensigi la lernantojn esperante.

Li krome kungvidis la aranĝon Aŭskultado, analizo kaj diskuto de modela leciono: "Ecoj de la instruisto" (Santos Morales,

Kolombio), apud Héctor Jiménez, ĝenerala kunordiganto de la evento. Li kondukis la temon Kursoj diversaj por plenkreskuloj. Analizo de la funkcio de la kursoj kaj strategio por garanti ilin, kaj la aranĝon Perkoresponda Kurso kaj analizo de senditaj kaj ricevitaj dokumentoj kaj ties plenumoj.

Du gravaj temoj estis Kiel traduki esperante kaj Utiligo de instruhelpiloj, respektive disertaciitaj de Maritza Gutiérrez kaj de kiu redaktantas ĉi alineojn.

La renkontigo ne konsistis nur el teoriaj prelegoj, sed ankaŭ el Praktikaj lecionoj sub reĝisorado de Martha Alonso k. Pedro Fernández. Jen, taŭga kiel kontroli ĉu efikis la seminaria teoriomado.

Specialan allogon rolis la temo Atento al infanoj, laŭ la spertoj de la partoprenintoj ĝenerale. Cielinte pliefikigi tiun ĉi parton, oni subdividis ĝin en: Prezento de programo por infanaĵaj kursoj k. renkontigoj, en la paroloj de Cirilo Ramos; kaj Porinfanaĵaj kursoj k. renkontigoj. Diversaj aranĝoj (ludoj, poemoj, teatraĵoj, ktp.), voĉo de Mayra Núñez. Cete-

Alexis Otero Castellón

re, ĉi muntis ekspozicion tiurilatan.

Multe impresis la homojn la surprizo preparita de Mayra kun anoj de najbara infanvartejo. Ŝi venigis en la klasocambro 20 personetojn tre amuzajn kaj diciplinajn. Kun diversaj frazoj ili montris *k i o m e b l a s* fari per E-o. kun infanoj, post nur kelkaj minutoj, se tiu staranta antaŭ ili kapablas eniri tiun fantazian mondon.

De starto ĝis fino, nia Seminario buntis kun mikso da festetosaj momentoj. Krom la bonveniga koktelo, la ĉeestintoj ĝuis diskuton de videofilmo k. grandan feston. Temis pri la kolofono, kie ĉiu opa partopreninto prezentis artaĵon: deklamo, muziko, danco, ludo, teatro, kc., kaj informis pri la aktivecoj en iliaj koncernaj teritorioj.

Kiel en antaŭaj okazoj, unu el la ĉarmoj de ĉi informkleriga kontakto kun instruistoj, ne nur estas plialtigi ties profesiecon sed ankaŭ transdoni tiujn konitaĵojn al la movadanoj de iliaj filioj. Se tio vere okazas, ni rajtas paroli pri ties plenumo kaj konkludo. Tiel, celoj kaj rezultoj iras samdirekten.

Kiel planite, oni aranĝis festetosajn renkontiĝojn, okaze de la nova datreveno de la Asocio (16an). La centraj sole-naĵojn havis du sidejojn, Havano kaj Holguín.

En Havano, la 16-an de junio ariĝis dudeko da asocioj en la Centra Oficejo kaj, inter kantoj kaj poezio, en tre modesta sed sentema etoso, ili ĝuis ĝis noktomezo neforgeseblajn momentojn. Julián Hernández alparolis la ĉeestintojn. Li elstarigis ties klopodojn por subteni la asocian laboron meze de la malfavoraj enlandaj cirkonstancoj, kaj invitis ĉiujn insisti tiudirekten.

Dume, en Holguín, dum tri tagoj (16a-18a) renkontiĝis 25 esperantistoj el la provincoj Guantánamo, S. de Cuba, Holguín, Las Tunas, Sancti Spiritus k. Havano por celebri la 2an Nacian Renkontiĝon en la orienta regiono.

Malgraŭ ke la aranĝo ne estis bone organizita, ĝi omaĝis la KEA-datreyenon diversloke. En la aranĝo la Nacian Estraron reprezentis Juan R. Rodríguez, kiu vojaĝis invitite. (Noktuo 4, 95.07.31.)

En la antaŭa eldono (majo/95), *Avanco* ekkomencis la publikigon de la Unua Skizo pri la Historio de la E-movado en Kubo. Tie aperis parto de ĝia Unua Periodo. Nun, sub la titolo "La Himeraj jaroj", ni konkludas la parton komencitan maje, kaj aldonas la sinsekvajn du periodojn de la menciita teksto.

Rigardo tra kvar jardekoj

JUAN RAMON RODRIGUEZ GOMEZ

EL LA UNUA PERIODO... (II)

1910-1918: LA HIMERAJ JAROJ

Pro la malsukceso de KES, la E-klubo de Havano, gvidata de la tiama studento pri juro Antonio Alemán Ruiz, fondas en la ĉefurbo, la 1an de januaro 1910, Kuban Societon por Propagando de Esperanto (KSPE), (1) kiu utiligas la reton de kluboj kaj delegitoj jam organizita de KES.

Post la fondiĝo, kion multe propagandas la gazetaro, tuj aliĝas al la nova Societo la kluboj en Báez, Santiago de Cuba, Caibarién, Guantánamo, Sagua la Grande, Lajas, Ranchuelos, Placetas, Encrucijada, Sancti Spiritus, Cienfuegos, Manzanillo, Gibara, ... En Santa Clara fondiĝas Virina Esperanto-Klubo, kiun gvidas la D-rino Juana Carrillo del Castillo. (2).

En la unuaj monatoj, KSPE eldonas modestan bultenon kaj iom poste (aŭgusto 1910) ekaperas nia dua E-periodaĵo: Cuba Esperantista, kies unuan numeron oni eldonas en Santa Clara; la aliaj dekunu -la lasta-

aperas en januaro 1914- estas eldonitaj preskaŭ tiam en malsamaj presejoj. Krom tiu regula periodaĵo, oni ankaŭ eldonas suplementojn kaj bultenojn. (3)

La fondaĵo de la Centra Oficejo de KSPE en la ĉefurbo ebligas pli rektajn kontaktojn kun la gazetaro kaj tial pli efikan propagandon. Multe influas la disvastigon de Esperanto nialande la okazigo de la 5a kaj 6a, Universallaj Kongresoj en Barcelono kaj Vaŝingtono, respektive en 1909 kaj 1910.

Post 1910, KSPE, kun vere nacia karaktero, kapablas organizi sian laboron kaj starigas rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio.

Komence de 1912, ekfunkcias Esperantista Librejo (ĉe la adreso de S-ro. Joaquín Martínez de Villa, poŝtkasto 1357, Havano), kie oni vendas tekstojn kaj propagandilojn, eldonitajn en- kaj eksterlande. Ankaŭ oni malfermas Informan Oficejon por fremdaj esperantistoj vizitantaĵ Kubon. (4) Tiu oficejo aperas ĉe la adreso Lonja del Comercio 423, poŝtkasto 1357.

En la sama jaro estas registritaj 449 geesperantistoj en la Centra Oficejo. Eble, la plej granda fakto rilate al la instruado de la lingvo en tiu momento estas kurso, kiu aperadis, redaktita de S-ro. Alemán Ruiz, en la ĉiusemajna revuo *Bohemia*, kiu disponigas tutan paĝon al E-o.. Pro la eldonkvanto kaj graveco de la publikaĵo, kiu estis vaste legata, plenrajte ni povas aserti ke la celoj de la kurso estis sukcese plenumitaj kaj sendube allogis multajn personojn ellerni la lingvon.

En 1913, la Societo estas reorganizita kaj oni elektas kiel prezidanton D-ron. Federico Grande Rossi, tiam profesoro de la Medicina Fakultato en la Havana Universitato. Lia estis la ideo krei katedron pri E-o. en tiu institucio, kio bedaŭrinde ne efektiviĝis.

En 1914, D-ro Mariano Aramburo estas elektita prezidanto de KSPE. Tiujara, la estinta prezidanto de KSPE, Antonio Alemán Ruiz, ricevas la Ordenon pro Meritoj kaj Honoro de la Kuba Societo de la Ruĝa Kruco, pro sia laboro kiel instruisto de la membroj de tiu institucio, kion li mem faris ankaŭ tie tri jarojn antaŭe.

La 24an de februaro 1914, por la projektita unua flugo Cienfuegos-Havano, la esperantisto kaj filatelisto Andrés M. Oliva Cuesta pretigas specialajn kovertojn, kie aperas kelkaj klarigoj en la hispana, esperanta kaj angla lingvoj; maldekstre oni legas: "Correo aéreo, aera poŝtvojo kaj air postway", esprimoj unufoje uzitajn en aeraj peroj en iu ajn el la tri lingvoj. La flugo.

pro teknikaj kialoj, lastmomente ne efektiviĝis kaj la lateroj estis senditaj per fervojoj. Modiaŭ, tiaj kovertoj estas veraj raraĵoj kaj oni nur scias pri kvar ekzempleroj. (5)

Post la malapero de Cuba esperantista, ekaperas Latinamerika esperantisto (hispane kaj esperante), kiel oficiala organo de KSPE kaj de Latinamerika Esperantista Ligo, organizaĵo kies fondiĝon por la disvastigo de E-o. en latinamerikaj landoj oni proponas en la unua numero. Ni povas certigi la aperigon de nuraj sep numeroj, de marto 1916 ĝis majo 1918. (6)

En 1917, la fama pentristo Esteban Valderrama donacas al KSPE pastelon de D-ro. Zamenhof, kiun oni reproduktas en speciala numero de Latinamerika esperantisto. (7)

Komence de 1918, la Centro de Dependientes del Comercio enmetas E-on. oficiale en la studaj programoj de siaj akademioj. La 24an de marto, la Instrua Sekcio de tiu institucio oficialigas la kursojn, kiuj ĝis tiu momento estis nur privata afero.

De la 2a ĝis la 8a de julio 1918, KPSE organizas Esperantistan Semajnon, bone diskonigita antaŭe per suplemento de Latinamerika esperantisto kaj kun grafika propagando (ni posedas ekzempleron).

Kun la malapero de Latinamerika esperantisto, kaj la aliaj menciitaj aranĝoj en 1918, fermas tiu ĉi periodo en la historio de la E-movado nialande, etapo vere riĉa, laŭ la kvanto da aktivecoj, propagando, eldonaĵoj, kursoj, ktp..

DUA PERIODO (1919-1930)

LA FAKTOJ PAROLAS...

Kelkaj kubaj esperantistoj kiuj antaŭe esploris komence pri nia historio opinias ke, inter la jaro 1914 kaj la fino de la Dua Mondmilito, nia movado disfalis kaj la propagando malaperis, sed ni ne konsentas tion (rigardu la elementojn aldonitajn de ni apartenantajn al la lastaj kvin jaroj de la Unua Periodo).

Vere, mankis -kaj mankas- pli intensa laboro en la esplorado de tiuj jaroj. En la Dua Periodo, ankaŭ, ekzistas kelkaj aferoj kiujn oni ne povas vidi izolitajn, sed kiel rezulton de iu konstanta aktiveco favora al E-o. en Kubo. Vidu kelkajn:

En 1921, la havanaj esperantistoj kunvenintaj en la Centro de Dependientes decidis intensigi propagandon, speciale en la ĉefurbo, kaj organizi senpagan kurson.

La 15an de aprilo 1923 okazas la unua radia propagando, pere de la radia stacio 2DW (en Obrapia # 93), konsistanta en disertado fare de la D-ro. Alemán Ruiz, sub la titolo "Bezono de internacia lingvo por radiotelefonaj komunikadoj" (8).

Ankaŭ en 1923, la Kuba Societo por propagando de Esperanto distribuas broŝuron nomitan "Esperanto kiel internacia helpa lingvo" (kun la informo aprobita de la Socio de Nacioj, la 14an de septembro 1922). En tiu jaro ekzistas delegitoj de UEA en Báez, Camagüey, Cardenas, Guanajay, Habana, Hatillo, Puerta de Golpe, Santiago de Cuba kaj Santa Clara.

Inter la 3ia de marto kaj la 6a de aprilo 1924, Kuba Societo por la Propagando de Esperanto okazigas Esperantistan Semajnon, kun sufiĉa propagando tiucele.

Kvankam sen precizigo de la dato, sciatas ke inter la jaroj 1926 kaj 1927, oni instruas la E-an. lingvon en la Popola Universitato "José Martí", kiel parton de la studaj programoj; la instruisto estas la pola elmigrinto Elias Johnofski. La elstara ĵurnalisto Enrique de la Osa -kiu ankaŭ estis lernanto tie- certigas tion. (9)

La 14an de majo 1928, la usonano Elias Johns (10) prezentas, en la Havana Universitato, sian doktorigan laboron pri E-o., kiel ebla solvo de la monda lingvoproblemo, kiu ĝis nun estas la ununura scienca bakulo por la IL iam prezentita en niaj universitatoj. De tiu jaro certigas la Enciklopedio de Esperanto la ekziston de 207 esperantistoj en 43 lokoj de la lando. (11)

En 1930, okaze de la 1a de majo, 16 kubaj laboristaj organizaĵoj sendas salutmesaĝon "al la liberaj laboristoj de Irkutsk", Sovetunio. La mesaĝo, sendita per privataj rimedoj, estis redaktita en Esperanto.

Tio sufiĉas por montri ke nia movado ankaŭ sukcesis en la Dua Periodo, kvankam oni scias ke, ĝenerale, en tiu etapo en la tuta mondo la aktivado de E-o. ne estis tiel taŭga kaj efika kiel en aliaj momentoj.

TRIA PERIODO (1931-1947)

LA ESTONTECO DIROS

De tiu ĉi periodo ni ne sukcesis ankoraŭ trovi multajn elementojn, sed almenaŭ oni povas certigi taŭgan kaj

oftan propagandon favoran al E-o. en Kubo, kio signifas ke en tiu epoko nia esperantistaro estis vigla kaj aktiva. Sendube, ni povus havi novajn konitaĵojn estontec, apartenantajn al la tridekaj jaroj kaj al la unua parto de la kvardekaj jaroj.

En tiu ĉi epoko, E-o aperas inter la dek du lingvoj uzitaj por diskonigi anoncon en Habano, revuo dediĉita al la fame konataj kubaj cigaroj. Juárez Sedeño certigas tion laŭ ekzemplero de la jaro 1938. La Komisiono havas alian numeron (jaro 1936). La teksto kiu aperas kune kun aliaj lingvoj estas: "Sur la ujo de la legitimaj Habanaj Cigaroj sin trovas tiu ĉi sigelo de garantio de kuba registaro".

Sufiĉas kontroli niajn arkivojn por koni pri la apero de diversaj artikoloj, informoj kaj notoj en la gazetararo. Tiel estas la kazoj de: Cuba intelectual, El figaro, Heraldo de Cuba, Diario de Cuba, Diario de la Marina, Bohemia, Información, El País, Cúspide, Carteles, ktp., pri kiuj ni parolos pli detale en nia Dua Skizo.

Pri la malapero de Kuba Societo por Propagando de Esperanto, ni ne povas klarigi ĝis nun. Nur ni scias ke la plej granda parto de la propagando de tiuj jaroj estis farita de la ĉefaj estroj de tiu organizaĵo. Meritas ripeti ke ankoraŭ mankas revizio de diversaj dokumentoj apartenantaj al tiu epoko, kaj oni esperas novaĵojn pri tio kaj pri aliaj okazintaĵoj.

En la kvardekaj jaroj notindas ankaŭ ekspozicio kun kelkaj dokumentoj rilataj al E-o. (ankoraŭ, ni ne povas precizigi la daton) kaj somera kurso organizita en la Fakultato pri Sciencoj de la Havana Universitato, en 1947. En tiu jaro, ankaŭ, la delegito de UEA en Havano, Heriberto Cociña Cociña, prelegas pri E-o. kune kun franca esperantisto en la Rondo de Amikoj de la Franca Kulturo. (12)

De tiu epoko ekzistas, krome, kelkaj artikoloj apartintaj en la ĵurnaloj Diario de la Marina, Información, Voz de España, El país, ... kaj en la revuoj Ideales y renovación, Bohemia, ... pri kio ni komentos en la proksima skizo.

Ĝis ĉi tie kion ni trovis pri tiuj jaroj, sed ni konvinkitas pri tio ke en la daŭrigo de nia esplorado oni trovos kelkajn aliajn elementojn pri la tria periodo de nia historio. La estonteco diros la veron.

(Proksimajn numerojn, ni daŭre aperigos la Unuan Skizon Historian de la Esperanto movado en Kubo. Unu plian fojon, ni invitas via diversaj opiniojn pri la temo.)

NOTOJ

Metodologie, en tiu ĉi parto, krom Esperanton, ni uzas la internacian kodon por sciencaj skribaĵoj (en la latina lingvo).

1 (S.A.): "En el tercer año", en *Cuba esperantista*, jaro III, n-ro. 1, januaro 1912, p.1.

2 Basilio E. Pérez: "El Esperanto en Cuba", en *Bohemia*, la 10an de oktobro 1910, p. 251.

3 Persona arkivo de la aŭtoro.

4 *Amerika esperantisto*, vol. XI, n-ro. 3, apr. 1912, p. 9; laŭ Alberto Fernández-Calienes, en *Notoj pri la historio de la E-movado en Kubo (1904-1983)*.

5 Héctor Juárez Figueredo: "Esperanto y filatelia", en *Filatelia cubana*, jaro XV, n-ro. 1, januaro-aprilo 1980, pp. 17-19.

6 Persona arkivo de Pedro P. Lamas Díaz.

7 *Latinamerika esperantisto*, jaro II, n-ro. 2, februaro 1917, p. 9.

8 Propagandilo kiu anoncas tion, laŭ sciigo sendita de Juárez Sedeño al mi.

9 Ricardo L. Hernández Otero: *Escritos de José Antonio Foncueva*, p. 291; laŭ sciigo sendita de Juárez Sedeño al mi.

10 Estas io interesa por ni la simileco de tiu ĉi persono -ne nur nome, sed profesie kaj epoke- kun Johnofski (la instruisto de la Popola Universitato), sed ankoraŭ ni ne povas klarigi pri tio.

11 Johannes Dietterle: "Statistiko", en *Enciklopedio de Esperanto*, p. 502.

BIBLIOGRAFIO

-Fernández-Calienes, Alberto: *Notoj pri historio de la Esperanto movado en Kubo (1904-1983)*. Havano, 1983, ne eldonita.

-Johns, Elías: *El problema de una lengua auxiliar internacional y su solución: el Esperanto*. Havano, Havana Universitato, 1928.

-Juárez Figueredo, Héctor: "Esperanto y filatelia", en *Filatelia cubana*, jaro XV, n-ro. 1, januaro-aprilo 1980, pp. 16-19.

-Kolekto de Cuba esperantista.

-Kolekto de Latinamerika esperantisto.

-Persona arkivo de la aŭtoro.

-Persona arkivo de Pedro P. Lamas Díaz.

-Pérez, Basilio E.: "El Esperanto en Cuba", en *Bohemia*, la 10an de oktobro 1910, pp. 250-251.

-Sciigoj senditaj de Raúl Juárez Sedeño al la aŭtoro.

Preparkomitato sin prezentas

Maritza Gutiérrez González

Nur du monatoj staras antaŭ la 2-a Nacia Kongreso de KEA kaj la koncerna Preparkomitato laboranta tiucele demarŝas laŭnecese por garantii sukcesan renkontigon.

La Preparkomitaton formas la jenaj samideanoj:

- Julián Hernández Angulo	Prezidanto
- Maritza Gutiérrez González	Sekretario
- Alberto Rodríguez Pineda	Kasistoj
Pedro Fernández Rodríguez	
- Manuel Rodríguez Rábago	Administrado
- Héctor Jiménez Batista	Klerigaj Arangoj
Roberto Torres Alvarez	
- Alexis Otero Castellón	Informado
Juan R. Rodríguez Gómez	
- Emilio Rodríguez Gómez	Transporto

Validas informi vin ke dum la UK-o en Finnlando, ni distribuis informan faldfolion pri la Kuba Kongreso kaj kelkaj amikoj, daŭre sopirantaj pri pasintaj tagoj en Kubo, dum la UK-o 75a, interesiĝas pri nia nacia evento. La kongreso okazos inter la 7a kaj 9a de marto 1996 kaj ĝi konsistigos taŭgan forumon por taksii la laboron plenumitan inter la 1-a kaj la 2-a kongresoj. Prelegontoj povas sin anonci al la Preparkomitato kiel eble plej frue por enmeto en la programo.

Pliaj informoj haveblas ĉe la Preparkomitato!

